

La batalo kontraŭ varmarko. Daŭre estu singardeme!

Kapitalisma atako kontraŭ Esperanto en Japanio

MIYAZAWA Naoto 33356

TEZOJ

- 1) Komploto gajni varmarkon rilate al Esperanta vorto fare de kapitalo estis intenco utiligi, ekspluati kaj parte monopoligi la popolan imagon ekzotan kaj kosmopolitecan pri Esperanto. La kapitalisto kiun granda kapitalo subtenas, atakis popolan lingvon Esperanto.
- 2) Esperantistoj kontraŭbatalis plurtavole. Malfortaj punktoj de la kapitalisto estis malestimo kontraŭ forto de esperanta movado kaj malfortiko de subtenanta granda kapitalo Tokyuo kontraŭ popola protesto.

PROCEZOJ

- 3) La 22-an de oktobro, 2020 ke la kompanio Gutenberg Orchestra (GO) al japana patentoficejo petis registri varmarkon angle kaj japane "Esperanto Culture Magazine" kiel titolon de sia nove eldonota gazeto en la tutangla sen iu konsiliĝo kun esperantaj organizoj, estas la komenco de la procezo.
- 4) La 15-an de decembro, la kompanio GO eldonis 10,000 ekzempleroj da la tutangla gazeto nomata "Esperanto Cultura Magazine". Pli ol duono da ekzempleroj estis planita vendi ekster Japanio.
- 5) Parto da estraranoj en japana granda esperanta organizo (la japana organizo) amikiĝis kun estro de la kompanio GO ĉar ili pensis ke la gazeto estis ŝanco propagandi Esperanton. La 18-an de decembro, la kompanio GO invitis kelkajn estraranojn de la japana organizo al parolevento por la gazeto, kaj aliaj kelkaj esperantistoj partoprenis en ĝi.
- 6) La 20-an de decembro, japana esperantisto, s-ano N de Esperanto-Biblioteko en Shimonoseki lanĉis alvokon por protesta movado kontraŭ la kompanio GO enlanden kaj tutmonden. Prezidanto de la japana organizo, s-anino K diris lian movadon kiel pribatan plendon kontraŭ ŝi kaj falsan informaĝon kaj ke japanaj esperantistoj ne traktu ĝin serioze. Do pro tio komence li izoliĝis.
- 7) La 25-an de decembro, prezidanto de UEA, s-ano C sendis leteron al prezidanto de la japana organizo s-anino K. Hokkajda Esperanto-Ligo (Japanio) publikis la Deklaron Kontraŭ Varnarko-Registro. Svisa Esperanto-Societo sendis la plendleteron al la kompanio GO kontraŭ Registrado de la marko Esperanto, kaj alvokis al japanaj esperantistoj individuaj kaj tutaj organizoj japanaj.
- 8) La 26-an kaj la 27-an de decembro, kunsidoj de estraranoj de la japana organizo okazis.

Kvankam prezidanto de la japana organizo forte insistis ke ili akordeme kunlabolu kun la gazeto, la estraranoj ne povis konkludi.

- 9) Prezidanto de la japana organizo sendis al japanaj esperantistoj leteron mildigi protestajn voĉojn kontraŭ la gazeto citante frazojn de la opinion de redaktoro de Libera Folio kaj eĉ leteron de prezidanto de UEA. Ŝi petis en ĝi esperantistojn ke kritiku la aferon surbaze de faktoj kaj diskuti kviete. Sed ŝi proklamis al estraranoj malpermeson de preparolo ekster ilia elsendolisto. Ordinaraĵoj membroj malfacile povis scii faktojn.
- 10) La estraranoj de la japana organizo daŭre diskutis ĉefe per elsendolisto, kaj decidis en 8 por kaj 2 kontraŭ ke ili postulas forigi vorton "esperanto" el la titolo de la gazeto. La decido estis grava por la kompanio GO kiu kalkulis aprobon de la estraranoj por la gazeto. Kaj ĝi akceptis la postulon de la estraranoj.
- 11) Sed, la kompanio GO ne retiris la peton por varmarkon "Esperanto Culture Magazine" kaj intencis vendi la varmarkon al la japana organizo post gajni novan varmarkon sen esperanta vorto.
- 12) La kompanio kompromisis, ĉar esperantistoj enlande kaj tutmonde batalis persiste, kaj ĉar estraranoj de la japana organizo apenaŭ firme traktadis kun la kompanio GO, kaj ĉar s-ano N de Biblioteko-Esperanto en Shimonoseki ekkolekti signaturojn kontraŭ la varmarkon de la kompanio GO per reta signaturejo Change.org. Ĉ. 500 homoj signaturis. Malgraŭ ne sufiĉa nombro, poste ĝi efikis grandioze.
- 13) Estis kuraĝige por sat-anoj en japanio ke SAT preparis deklaron kontraŭ la varmarkon kaj balotis por tio, malgraŭ neefikeco en la situacio pro malfrua decido.
- 14) De la 15-a de januaro, 2121, la organizantoj aldonis signaturan celon granda kapitalo Tokyu. Pro tio estro de la kompanio GO estis premata de kapitalo Tokyu ke la kompanio GO plej eble frue solvu la konflikton kontraŭ esperantistoj. Estro de la kompanio GO petis ĉesigi la movadon por signaturoj, eĉ sugestis por timigi la movadon ke kapitalo Tokyu eblos akuzi la organizanto de signaturoj pro malhelpi funkcion de la Tokyu. Estraro de la japana organizo respondis ke illi povas fari nenion, ĉar la organizanto de signaturoj ne estas membro de la japana organizo. Post, la estro de la kompanio GO kontaktis lin kaj ekkonis ke la organizanto ne subiĝos, li permesis retiri la peton por la varmarko. Nun (la 27-an de februaro), la protesta movado avertiĝante ĉu la kompanio reale retiri la peton de la varmarko, deklaris la venkon.

INSTRUOJ

- 15) En 1905 monda esperantistaro deklaris en la 3-a artikolo de Bulonja Deklaracio "Esperanto estas 'nenies propraĵo', nek en rilato materiala, nek en rilato morala." Tial, ne estas akceptebla ke iu ajn havos varmarkon kiu entenas esperanta(j)n

vorto(j)n por presaĵo, retejo ktp. konsidere al nia internacia komunikado, kulturo, lingvo ktp. Esperanta movado nur implice konsentas esperantaj varmarkojn en la kampoj nerekte rilataj de esperanta movado.

- 16) Eĉ esperantaj organizoj baze ne rajtas havi esperantaj varmarkojn. En la kazo de speciala bezono de varmarko la organo organizu sufiĉan diskuton kaj gajnu konsenton en esperantujo.
- 17) Varmarka rajto estas komerca rajto privilegie ekskluziva. Oni povas rezervi la varmarkan rajton duoneterne, kaj facile gajni saman rajton en alia lando per Madrida Protokolo.
- 18) Estas teorie libere ke oni metas esperanta(j)n vorto(j)n en sia gazeto, se la gazeto ne postulas privilegian rajton varmarko. Sed tio ne signifas la gazeto estas libera el kritikoj kaj protestoj de esperantistoj.
- 19) La redaktoro de la gazeto insistis ke lia "Esperanto" estas metafora kaj en esperanta kulutulo por li ne ekzistas internacia esperanta movado eĉ nek internacia llingvo Esperanto. Multaj esperantistoj esprimis malagrablegon pri la gazeto kaj kritikis, kaj protestis la gazeton. Plej parto de ili estis pravaj.
- 20) La redaktoro de la gazeto insistis utiligi la varmarkon nur en Japanio, nur tri ligitajn vortojn "Esperanto Culture Magazine" kaj la japanan esprimon de ili. Tio estos apliko de la varmarka rajto laŭ "bonvolo" de la redaktoro. Sed ĉiam la situacio por la "bonvolo" ne estos stabila ĉar la kompanio havos eblecon ŝanĝi redaktoron aŭ vendi varmarkon ktp.en kapitalisma socio.
- 21) La rajto de la varmarko post registro laŭ la leĝo estas firma rajto kiun oni nuligi nur per juĝo aŭ per aĉeti la rajton. La estraranoj de la japana organizo ne havis sufiĉan komprenon de graveco de la varmarko. Ilia postulo al la kompanio GO estis unue demeti la vorton "esperanto" el ĝia titolo, ne rezigni la varmarkon.
- 22) Kontraŭ la varmarko oni povas doni rilatajn informaĵojn al patenta oficejo, ekscpeccii la varmarkon al la oficejo kaj poste per jam menciita maniero, juĝi. Kompreneble ne ĉiam ekscpecciantoj venkas.
- 23) Karaktero de ĉi-foja batalo estas plurtavola. Diversaj esperantistoj enlandaj kaj tutmondaj preparis ekscpeccii la varmarkon de la gazeto. Nekompromisema tendenco en la estraro de la japana organizo persiste intertraktis kontraŭ la kompanio GO, kvankam la unua postulo de ili ne estis pri la varmarko. Samtempe plej frue protestanta esperantisto N organizis la diskutojn kaj protestajn deklariojn de esperantaj organizoj enlande kaj tutmonde nome, La Esperanto-Bibliotrko en Ŝimonoseki (el OkcidentJapanio), Esperanto-Societo en Numazu (el MezJapanio), Hokkajda Esperanto-Ligo (el NordJapanio), Japana Esperanto-Instituto (Landa Asocio de UEA), Svisa Esperanto-Asocio, Universala Esperantao-Asocio. Li lanĉis signaturan movadon per Change.org. Ĉ.

500 esperantistoj kaj neesperantistoj enlandaj kaj tutmondaj signaturis. Li sendis protestleteron kaj signaturojn unue al la kompanio GO poste al la granda kapitalo Tokyu kiu subtenas la kompanion GO kaj la gazeton. Ĉar la Tokyu volas eviti malbonigon de sia bona imago de popolo, ĝi definitive altrudis solvon de la konflikto kun esperantistoj al la kompanio GO. Hokkajda Esperanto-Ligo ricevis solidarecajn mesaĝojn de laborista sindikato Kannama (Kansajo en Japanio) kaj laborista sindikato Rentai en Sapporo. Kelkaj membroj de Hokkajda Esperanto-Ligo planis kunvenon, manifestacion kaj propagandon surstratan kontraŭ la kompanio GO kaj granda kapitalo Tokyu.

- 24) Ĉar ne malmultaj esperantistoj enlandaj kaj tutmondaj aktive partoprenadis en la diskuto kaj la movado, kompromisema tendenco en estraro de japana organizo iĝis izolita. Komence homoj en la tendenco esprimis la protestantojn kiel "privata plendemulo" kaj "politikaj aktivistoj".
- 25) La batalo kontraŭ rajto de varmarko estas leĝa batalo kaj popola batalo per signaturo, kunveno, manifestacio ktp. La batalo kontraŭ stranga koncepto de Esperanto kaj enhavo de la gazeto estas perparola kaj diskuta batalo, do ni kritiku kaj diskutu vaste eĉ envolvigate la gazeton, se ni povas.
- 26) Esperantistoj kiuj volis kompromisi kun la gazeto, subjektive intencis propagandi Esperanton per sâncio de eldono de la gazeto, tute ne tranĉvendi rajton de Esperanto. Tamen la esperanta movado havas sufiĉan forton, ne bezonas la kapitalon kiu havas strangan koncepton sen la lingvo internacia kaj sen la movado por ĝi. La esperanta movado montris sufiĉan kapablon dum la batalo kontraŭ la varmarko.
- 27) La plej malbona punkto de la kompromisa tendeco estis ne malbona opinio de ili sed malbona administrado por diskuto de ili. Ili intencis anonci informiĝon tre limigite al membroj de la japana organizo. Prezidento de la japana organizo multfoje avertis ke ĉiu estrarano ne transsendu enhavon de estrarana dissendolisto al ordinaraj membroj en preteksto de libera diskuto por la estraranoj. Ŝi postulis al eĉ prezidanto de UEA ne malfermi diskuton sekreton en la japana organizo al japana membro de UEA. Prezidanto de Esperanto-Societo en Numazu (Japanio) H skribis en la pribata letero al prezidanto de UEA "Mi ne povas ne kritiki la fomitecon de la estraranoj de la japana organizo. La prezidanto de la japana organizo ne rajtas koleriĝi. Koleriĝi rajtas ni, la ordinaraj membroj de la japana organizo."
- 28) Estraro de la japana organizo ĝis nun (la 27-an de februaro) neniam respondis al miaj postuloj en la 31-a de decembro, la 6-a kaj la 17-a de januaro publikigi protokolojn de estrara kaj vicprezidenta kunsidoj, publikigi interdiskuton de estrara elsendolisto por raportoj kaj agadi surbaze de faktoj.
- 29) K-do H de Numazu skribis "Ni ne tro multe atendu eksteran forton. Ni fosu nian sulkon

per nia propra forto, eĉ se ĝi estas malgranda.” Kontraŭ atako de kapitalismo, esperanta movado devas kredi fortojn de esperantistoj kaj popolo. Grave estas diskuti kaj batali per plej eble malfermitaj informaĵoj.